

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORIA - DIREKTORO: RAMON DE SALAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

LIRIKAĴO DE CURRO ENRIQUEZ

Legita de la aŭtoro okaze de la entombigo de Rosalia de Castro kaj dediĉata de la tradukinto al siaj kunsocietanoj de Frateco.

Mi ŝin vidis iri laŭ l' bordo de l' mar'
Kun stel' sur la frunto: ĉe l' lipoj, kantar'.
Dum nokto senfina soliris ja ŝi
Kaj por freneza la ino mi preĝis,
Eĉ bezonante preĝanton por mi.

La muzo popola—pri ŝi mi raportis—
Mangita de lupoj, mangita, ve, mortis;
Por tuj entombigi jen ŝia l' ostar'.
Zorgu, portantoj surfruntan la stelon!
Zorgu, kantantoj per dolĉa kantar'!
Zorgu, kantantoj per dolĉa kantar'!

El la galica tradukis,
MANUEL VÁZQUEZ.

Madrid.

Skolta Tendaro en Pirineo


Same, kiel en antaŭaj jaroj, la zaragozaj skoltoj tendaris ĉi tiun someron sur ĉarmoplenan restadejon montaran, kie ili bonege pasigis duonmonaton.

Nunjare la tendarrestado okazis en valo "Pineta", kien ili veturis per motorom.ibusoj. Post nemulta tempo ili elstarigis tre bone aranĝitan tendaron kun ĉiuj necesaj provizoj kaj instaloj, kiujn tre multe laŭdis multenombraj personoj ĝin vizitantaj.

Valo Pineta estas tre taŭga centro por ekskursoj pirineaj. El ĝi oni grimpekskursis sur pinton "Monte Perdido" (3.351 m.), en ĉirkon "Gavarnie" (Franclando) kaj apud montlagon Marboré, krom multaj aliaj malpligravaj ekskursoj.

La vetero estis bona. Nur furioza fulmotondraro kun torenta pluvego eksplodis noktomeze foje, sed

tiel terure, ke ĝi tute inondis la tendarlokon kaj estis necesa inteligenta laborado por defluigi la akvon penetrantan ĉien. Tre bone montris ja la skoltoj tiun nokton sian bonan disciplinon kaj efikan instruon. Generale la suno brilis tiel abunde,



Skolta tendaro en valo Pineta

ke ĝi ebligis la ĉiutagan sinbanon en la lago spite ĝian malaltan temperaturon.

La kuirejo funkciis bonege. Estis mirige vidadi la aspekton de la tendaro, kie mankis-neniu detalo. Multajn gratulojn ricevis la skoltoj precipe de kelkaj fremdaj turistoj, kiuj pro afabla invito gastis tie dum kelkaj tagoj.

Post kiam la skoltoj foriris, okupis la tendaron la "Muchachas Guías" (skoltinoj), kiuj malgraŭ la malbona vetero tiam reganta ekskursis en la valfundon, la ermitejon "Virgen de Pinieta". la proksimajn arbarojn k. t. p. Ĉiuj ekskursoj rezultis tre ĉarmaj kaj allogaj por ili.

Nian sinceran gratulon al tiu meritplena institucio.

EL « KIHOTO »

ĈAPITRO II

KIE ONI SOLVAS KAJ FINAS LA MIRIGAN DUELON, KIUN HAVIS LA MALTIMA VASKO KAJ LA KURAGA MANĈO

En la unua parto de tiu ĉi historio ni lasis la bravan Vaskon kaj la faman don Kihoton kun levitaj seningaj glavoj, pretaj ellasi du furiozajn fendbatojn, ĉe kies plentrafo ili ambaŭ disduiĝus kaj trafendiĝus de supre malsupren, disigante kvazaŭ granato. En tiu ĉi tiel duba rakontpunkto la plaĉega historio haltis kaj dismembriĝe restis sen sciigo de la aŭtoro pri la loko, kie oni povis trovi ĝian mankparton. Tio tre ĉagrenis min, ĉar la plaĉo estis tiom malmulte leginta fariĝis malplaĉo per la penso pri la malbona vojo, kiu montriĝis por trovi tion multan, kiu laŭ mia opinio mankis ankoraŭ al tiu plezuriga rakonto. Ŝajnis al mi neeble kaj kontraŭ ĉiu bona kutimo, ke al tiel bona kavaliro estu mankinta iu saĝulo sur sin prenanta la raportadon de liaj neniam viditaj herooj. Tio ne mankis al iu kavaliro pri kiu la publiko diras, ke li iras al siaj aventuroj, ĉar ĉiu kavaliro havis, kiel ĝustdifinite, unu aŭ du saĝulojn, kiuj ne sole raportskribadis liajn farojn, sed ankaŭ pentradis liajn plej sensignifajn pensojn kaj infanaĵojn, eĉ restantajn plej kaŝite. Nia bona kavaliro ne estus, do, tiel malfeliĉa por tion ne havi, kio malmankis al Platir kaj aliaj similaj. Tiel mi ne povis inkliniĝi kredi, ke tia belevidiga historio restu mankhava kaj difektita kaj pri tio mi kulpigis la senkorecon de la tempo, kiu finglutas kaj konsumas ĉiujn aferojn kaj havis ĝin aŭ kaŝita aŭ konsumita. Aliflanke, ĉar inter liaj libroj oni trovis kelkajn tiel modernajn, kiel *Disreviĝo el ĵaluzo kaj Ninfoj kaj Paŝtistoj el Henares*, ŝajnis al mi, ke lia historio ankaŭ devas esti moderna kaj, se ne skribita, restus almenaŭ konservita en la memoro de la geloĝantoj en lia vilaĝo kaj en la ĉirkaŭnajbaraj. Tiu ĉi penso restigis min en konfuzo kaj deziro vere kaj efektive scii la tutan vivadon kaj farojn de nia fama hispano don Kihoto de la Manĉo, lumo kaj spegulo de la manĉaj kavaliroj, kaj la unua, kiu en nia epoko kaj en tiuj ĉi malfeliĉegecaj tempoj dediĉis sin al laboro kaj profesio de la vagiraj armiloj, al malfarado de ofendoj, helpado al vidvinoj kaj protektado al fraŭlinoj, el tiuj, kiuj rajde, kun vipo en mano kaj ŝargitaj de sia virgeco, iradis de mont' en monton kaj de val' en valon, kaj se iu malnoblulo, aŭ militarmita malnobelo aŭ supermezura giganto ne estus ilin perfortinta, sendube en la pasintaj tempoj, estus fraŭlino, kiu post okdek jaroj, dum kiuj ŝi eĉ unu nokton ne dormis sub tegmento, mortus tiel virga, kiel la patrino ŝin naskinta. Tiel, do, mi diras, ke en tiu ĉi kaj multaj

aliaj rilatoj nia svelta don Kihoto estas inda je senĉesaj kaj rememorindaj laŭdoj, kiujn eĉ al mi oni ne davas rifuzi pro la laboro kaj diligenteco, kiun mi uzis serĉante la finon de tiu ĉi agrabla historio. Tamen, mi bone scias, ke se la ĉielo, hazardo kaj sorto ne estus kunhelpintaj al mi, la mondo restus sen ĝi kaj sen la amuzo kaj plezuro, kiun oni povas havi preskaŭ dum du horoj, ĝin atente tralegante. Mi okaze trovis ĝin en sekvanta maniero:

(*Daŭrigota*).

DE LA KAPELETO

Mallargha vojo supreniras serpentumante inter arbustoj kaj rokoj el la profunda valo ĝis la montsupro. De ĝia rando oni vidas tien, malsupren, kiel nigroruĝa makulo, la vilaĝajn tegmentojn, kiuj ŝajnas mallarghiĝi kaj malgrandiĝi antaŭ la grandeco de tiu montara cirko.

La kaprinoj rigardas scivole de rokoj, sur kiuj ŝajnas neeble sin teni, la grandiozon de la pejzaĝo, la verdon de la valo kaj la ĉiaman kaj impresan silenton, kiu envolvas ĉion. Kiam oni parolas, la rokoj rediras ĉiam, per terura sono, la lastajn silabojn de la vortoj.

Sur la supro de plej altega roko, ne timante la ventojn, kiuj batas ĝin daŭre staras malgranda kapelo senhoma, malgaja, nur karesata per hedera ĉirkaŭprenno.

Antaŭ multe da tempo ĝi estis forlasita kaj pro tio oni vidas tra la vundoj de ĝiaj muroj la internaĵon tute plena je ŝtonoj. Flanke de la roko, kie staras la kapelo, ekzistas granda profundegajo, sur kies fundo oni vidas malgrandega pro la distanco lignan krucon ĉirkaŭprenatan per dorna rozujo.

Kreskas rozoj ruĝaj kiel sango; kiel la tragedio, kiun ili enfermas en sia brusto.

Ĝi estas malgaja tragedio, tiel malgaja, ke ĝi povas esti epilogo de malfeliĉa amo.

Okazis antaŭ multaj jaroj. La vespero, kiam la jam subiranta suno sangruĝe kolorigis la nubojn, aperis sur la vojo al la vilaĝo veturilo alportante ĉarman kaj palan knabinon de juna viro akompanatan.

Neniu scias, de kie ili venis nek kiel ili estas nomataj. Eŝtis somero kaj ĉiujn vesperojn, kiam la suno estis malsupre, ne povante jam penetri en la trankvilan valon, ili eliris por promeni ne parolante kaj malgajaj tra la turniroj de la voĵeto.

Si fartis malbone; ŝia pala vizaĝo kaj ruĝaj makuloj de ŝiaj vangoj, montris ŝian malsanon kaj ŝian proksiman finiĝon okazontan, kiam falos la folioj de la arboj.

Sia vivo estis, kiel simpla folio atendanta la venontan aŭtunan venton, kiu forprenos ŝin al la loko nekonata, kien ĝi rapidas.

Pro tio ĉiam malgaje ili marŝis.

Iun tagon la horo alvenis, kiam la valo kovriĝis per profunda senlumo kaj la vento ŝajnis alporti plendojn tra la kavaĵoj de la ŝtonoj.

Tiun nokton ili ne revenis. Kaj ili ne revenos plu... Ĉar la sekvantan tagon, kiam la unuaj lumoj eklumiĝis la teron kaj la simplaj vilaĝanoj foriris al siaj laboroj, trovis, sur la sama loko, kie

nun staras la kruco, la sangomakulitajn korpojn de ambaŭ amantoj.

Neniam iu sciis, kiuj ili estas, sed en la intima animo de la vilaĝanoj ĉiam ekzistas humila penso por la geamantoj, kiam ili vidas la lignan krucon ĉirkaŭprenata per kompatema rozujo.

F. CRUZ DE LA ROSA.

RAPORTO PRI VOJAĜO AL 27^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La tagon 28an de Julio de 1935 vespere ni forlasis Valencion, pasigis tutan nokton en vagonaro kaj la 29an frumatene ni estis en Barcelona, kie ni renkontis geedzojn Loyola kaj alian geedzan paron; la unuan ni konas de la Kongreso en Kolonjo (jaro 1933) ĉiuj ni veturis vagonare tutan nokton kaj matene atingis la urbon Nice, kiu kuŝas en la franca regiono konata per la nomo "Blua marbordo" Nice estas simpatia urbo multe ĉeestata ĉium vintro, ĉar ĝia klimato estas tiam tre milda. Dum somero ankaŭ estas tie multaj personoj zumantaj ĉe la marbordo kaj, eĉ en la stratoj mem, ĉiu uzas nur malpezan veston sur sia bankostumo. Tie ni restis du tagojn, unu vesperon ni iris al tre famkonata loko Monte-Carlo, kie estas belaj apudmaraj promenejoj kaj precipe staras la Kazino, kiun ni ankaŭ vizitis kaj vidis multajn personojn riskantajn sian monon je monludoj. En Nice ni trovis la francan karavanan "C", kiu uzis rezervatan vagonon por sia vojaĝo. Ĉar ni trovis liberan lokon en ĝi, ni aliĝis al la antaŭkongreso en Bordighera. Ĉi tiu aranĝo estis ĉe la itala "Blua marbordo" en tipa banurbo, kie ni ĝuis baloj kaj aŭtobusajn ekskursojn al proksimaj vidindaĵoj. Ni vizitis tre belan interesan ĝardenon, kie kreskas miloj da diversaj specoj el kaktaj kaj aliaj graso-planktoj. En la proksima luksa urbeto Sanremo la aŭtoritatuloj regalis nin per vespermanĝeto kaj glaciaĵoj, ankaŭ estis dancado kaj vizito al Kazino, kie ni vidis tre luksajn salonojn kaj multajn okazojn por ke la naivuloj povu perdi sian monon. La aranĝo de la antaŭkongreso funkciis tre bone organizata kaj la vizititaj lokoj estas vere mirindaj.

Per la sama vagono rezervata de la karavano "C" ni iris al Genova, kie por ekkoni la urbon ni promenis vespere kaj post la vespermanĝo. Sekvantane matenon (3an Aŭg.) tre frue ni iris al Firenze, unua kongresurbo. La urbo ne estas granda, sed ĝi estas vera muzeo pri arkitekturo kaj skulptarto, en stratoj oni vidas ofte fontanojn aŭ ornamajn skulptaĵojn.

Ĉar mia edzino kaj mi ne estis aliĝintaj al vojaĝo tra Italio "T" ni havis sendependecon pri vizito de la urboj, lokoj por dormi kaj restoracioj.

Ni trovis facile bonan ĉambron nemultekostan en la sama hotelo, kie la karavananoj estis loĝantaj. Ni ja atingis tian rezulton, ĉar ni kapablas kompreni la italan lingvon kaj la italoj tre facile komprenas hispanparolantojn (krome mi scipovas iom la italan lingvon).

(Daŭrigota).

Opinioj pri Sango kaj Sablo

El «Hispana Esperanto Gazeto»: 232 paĝoj. 8'50 pesetoj por Hispanlando, sendkosto enkalkulata. Ĝi estas bona traduko de la fama romano de Vicente Blasco Ibáñez farita de nia samideano Ramón de Salas (prezidanto de "Fraterco", strato Roda, 14 kaj 16, Zaragoza), kiu lerte venkis la malfacilaĵojn de la traduko de iaj frazoj tro regionaj. Estas konvenaj la novaj vortoj (kies signifon oni klarigas ĉe la fino de la verko) por traduki iajn esprimojn, kaj oportuna la antaŭparolo. Certe ne ĉiuj hispanoj estas taŭremuloj nek ĉiuj taŭremuloj estas hispanoj. Blasco Ibáñez mem montrante la kruelecon de la publiko, kiu altrudas al homoj sin ĵeti en danĝeron kaj postulas la oferon de la ĉevaloj, kondamnas la tielnomitan feston per la lasta frazo de la verko: "Jen kiel la vera, la nura rabbesto raŭke blekas".

Eble iaj vortoj ne estas trafe tradukitaj: *liberpensano* (paĝo 153^a) anstataŭ *liberpensulo*; *tenorulo* (p. 117^a a. *tenoro*); *novula* (p. 195^a), k. e. La titolo mem "Sango kaj Sablo" estus plibone "Sango kaj areno". Sed, kiel diris Cervantes, "haŭt-makuleto sur bela vizaĝo plibeligas ĝin". Bona papero. Arta librofasado. Jen havinda verko.

NEDERLANDO

Kiam mi ricevis la peton, ĉu mi volas verki artikolon en via bulteno, mi tuj konsentis, sed samtempe demandis min: kion mi rakontos al miaj hispanaj gesamideanoj? Ĉu vi antaŭe aŭdis ion pri la malgranda lando en la nordo de Eŭropo? Vi eble scias, ke en la komenciĝo de la deksesa jarcento miaj praavoj rabis hispanan arĝentsiparon. Sed mi ne volas paroli pri antaŭaj tempoj; tamen mi volas rakonti ion pri la nederlandaj pejzaĝoj kaj popolo, speciale pri la frisaj.

Frislando estas unu el la du plej nordaj provincoj de Nederlando. La tero konsistas plejparte el fruktodona argilo, tiel ke la plej gravaj vivrimedoj ĉi tie estas la terkulturo kaj brutproduktado.

Biciklante (oni multe biciklas en Nederlando), laŭ la vojoj, oni superrigardas la verdajn kampojn tranĉatajn per multaj fosaĵoj kaj kun ĉi tie kaj tie pentrandaj akvomueliloj, dum la pejzaĝo estas plivivigata de la brutaro, plejparte konsistanta el nigraj-blankaj bovinoj; la gloro de Frislando.

Sed ankaŭ la kulturejoj donas belan aspekton kun la diversaj kreskaĵoj kaj precipe printempe, kiam floras la bulbkampoj de tulipoj, narcisoj kaj hiacintoj, oni sentas la bezonon iri en la liberan naturon. Ĉu vi scias, ke la farmistoj kaj ankaŭ aliaj personoj en la kamparo ne portas ledajn, sed lignajn ŝuojn, kiujn ni nomas "klompen"? Ĝi estas tre varma kaj praktika piedvestaĵo.

Alia flanko de la frisa lando estas ĝiaj multaj lagoj kaj laĝetoj, kiuj donas grandan ĉarmon al la ebena lando. Multaj kaj multaj homoj posedas velboaton aŭ barketon, kaj dum liberaj tagoj veturas sur la akvovojoj ĉien.

Bedaŭrinde la somero estas tre mallonga ĉi tie kaj la varmaj tagoj malmultaj. Ni havas longan, ofte pluveman vintron; precipe en printempo la vetero estas ofte malmilda kaj miaj pensoj iras al la pli varmaj landoj, kiel la via, kaj mi deziras esti tie.

Nur kiam frostas kaj la akvo en la multaj kanaĵoj kaj lagoj glaciĝas, la nederlandanoj kaj ĉefe la frisoj revivas: la plenkreskuloj kaj la infanoj, la viroj kaj la virinoj aperigas siajn glitkurilojn kaj diversaj surglaciaj festoj estas organizataj.

La lastan aferon, kiun ni volas diri pri la frisaj homoj estas, ke inter ili ekzistas multaj esperantistoj; eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj oni trovas Esperanto-klubojn.

Mi esperas, ke la estonto donos al ni la finfinan venkon de Esperanto kaj per ĝi pacon por la tuta homaro.

NEDERLANDA SAMIDEANINO.

LA HORLOGO DE NEWTON

Iun tagon estis Newton absorbite de siaj profundaj filozofiaj meditoj, kiam lia servistino eniris en lian laborĉambron, ŝi alportis kaserolon kaj freŝan ovon, kiun ŝi volis kuiri en ĉeesto de sia mastro por servi ĝin tuj; tio estis la ĉiutaga manĝo de la scienculo.

Newton, kiu volis resti sola, ordonis al la servistino, ke ŝi foriru, ĉar li mem kuiras la ovon.

La servistino lasis la ovon sur la tablon apud la horloĝo de l'filozofo, konsilante, ke li lasu la ovon nur dum tri minutoj en la bolanta akvo; kaj ŝi foriris.

Imagu ŝian miron, kiam ŝi revenis post horduono por purigi la tablon kaj trovis sian mastron staranta antaŭ la kameno kun la ovo sur la mano kaj la horloĝo en la bolanta akvo de la kaserolo!

L. TIL.

Samideana Sportvenkinto

En la sportkonkurso okazinta la pasintan monaton en nia urbo inter aragonaj altetoj venkis pri saltado nia komitatano kaj delegito en Hispanlando de Skolta Esperantista Ligo Sro Aleksandro Petro Marqueta, kiu ankaŭ la pasintan jaron rezultis venkinto pri la sama sporto.

Plej varman gratulon ni esprimas tie ĉi al nia kara komitatano same, kiel al la skoltaj atletoj, kiuj entute venkis la ceterajn konkurantajn sportasociojn.

PENSOJ

Anarĥia kulturo produktadas pli multe da malfelicajoj, ol la plej terura domaĝo.

* * *

Akcepti teorion, ne atentante tiun kontraŭan, estas kvazaŭ marŝi per nur unu kruro.

* * *

Deziri, ke ĉiuj estu samaj, estas pretendi utopion. En nia korpo mem estas io, kio ordonas (la inteligento), kaj aliaj aĵoj, kiuj obeas (la membroj); kion oni bezonas, tio estas, ke la inteligento zorgu, por ke la membroj ne ricevu malbonaĵojn kaj sekve pro la doloroj de siaj membroj suferu ankaŭ la inteligento.

JOSÉ ORÓS.

LOTERIA DE NAVIDAD

Núm. 29.243

Como ampliación a lo publicado en el número anterior, se advierte a los señores socios residentes fuera de Zaragoza, que habrán de enviar, con la petición, además del gravamen de 0'05 ptas. por cada peseta que jueguen, el importe del franqueo y certificado (0'60 pesetas por cada veinte participaciones o fracción) para remitírselas por correo, a no ser que deseen que se les envíe contra reembolso, en cuyo caso se incluirá en éste, además de las cantidades indicadas, veinticinco céntimos por derecho fijo de reembolso y el del giro con arreglo a la cantidad a pagar en el momento de la recepción del certificado, según las tarifas postales.

Las peticiones habrán de dirigirse a nuestro cajero, don José Larruga, calle Convertidos, 9, imprenta, Zaragoza.

Se advierte que por haber sacado las 4.000 pesetas, este año no se ha señalado límite de participación para cada socio y que, por tanto, serán atendidas, mientras haya existencia, cuantas solicitudes se hagan. Procede, pues, que cuanto antes hagan la petición, con el fin de evitar que, como ha sucedido en años anteriores, no se pueda complacer a los que recurren a última hora.

LA DIRECTIVA.

SPRITAĴOJ

Inter amikinoj:

—Ĉu ne vere, ke Mariino havas sekreton?

—Jes; sed ĉu ŝi ankoraŭ ne rakontis ĝin al vi?

* * *

Antaŭ kelkaj jaroj studento nomata Farlete vetis kun amiko, pri tio ke li respondos laŭ rimo la demandojn dum ekzameno, kiun li estis suferonta.

Jen la ekzameno:

—Kio estas lego?

—Tio ordonata de l'Reĝo.

—Ĉu vi estas poeto, sinjoro Farlete?

—Iomete.

—Ĉu min mokas vi?

—Tion ne intencas mi.

—Nu, mi estos vin malaprobanta.

—Tion estas mi timanta.

—Iru for el ĉi tie.

—Mi obeas rezignacie.

Komprenoble li malsukcesis pri la ekzameno, sed sukcesis pri la veto. 1

* * *

En la oficejo:

—Triafoje en ĉi tiu semajno ni trovas vin dormanta—diras oficestro al oficisto.

—Pardonu min. Mia plej malaĝa fileto ne lasas min dormi.

—Tiukaze kial vi ne portas ĝin en la oficejon?